

Isra'ela Esperantisto

(ANTAŬE "NIA LIGILO")

ORGANO DE ESPERANTO-LIGO EN ISRAELO (E.L.I.)

Tel-Avivo 61390, Poŝtkesto 39004.
N-ro 50 - Marto 1974

DAVID BEN-GURION (16.10.1886-1.12.1973)

Forpasis la plej granda gvidanto de la Juda Popolo en ĉi tiu generacio, kiu jam dum sia vivo fariĝis historia figuro. Liaj ecoj karakterizas la grandajn personecojn en la historio.

Du nomoj lumigis unuavice la ĉielon de la Juda Popolo dum la lasta centjaro. La meteoro d-ro Teodor Hercel, kiu skribis vizian verkon: "La Juda Ŝtato" kaj donis al popolo soifanta je malsklaviĝo, politikan konsciencon.

Ben-Gurion, kiu realigis la vizion de Hercel, fondis kaj arkitektis la Judan Ŝtaton en speciale malfavoraj internaciaj cirkonstancoj.

Fine en la kvardekaj jaroj de la centjaro, post malfacilaj kaj teruraj horoj de genocido en Eŭropo, kiam restaĵo de postvivantoj en koncentrejoj esperis savon kaj liberigon, kiam la brita-palestina mandato disrompiĝis kaj la ekzistado de la Juda Popolo estis danĝerita - aperis Ben-Gurion, kiel ĝusta persono en ĝusta tempo kaj ĝusta loko.

En severa batalo li turnigis la torenton de la juda historio al sendependeco. Sen lia kuraĝo kaj gvidkapableco ne estas certe, ĉu Israelo povus renaskiĝi. Li estas do la patro de sendependeco.

Liaj ĉefaj atingiĝoj estis: fondiĝo kaj konstruo de la juda ŝtato de ĝia bazo; organizo de la israela armeo; venko en sendependencmilito; absorbo de la granda enmigro de Judoj de la tuta mondo; establo de ĉefurbo de Israelo en Jerusalemo; revivigo de la dezerto Negev, ktp. A. M.

 LA HOMOJ DE KONSCIENCO

En la dua duono de 20-a jarcento, en la mondo, en kiu regas la egoistaj interesoj anstataŭ idealoj, mondo en kiu guto da nafto valoras pli ol riveroj da sango, grave estas montri izolitajn fajrerojn, kiuj traboras ĉirkaŭantan nin mallumon.

Estas do por ni honora devo indiki, se ie troviĝas iu humanisto, kiu gardas la honestecon. Ni mencias ĉi tie kelkajn famajn verkistojn, kiuj kuraĝis lautvoĉe mallaŭdi la murdigan atakon de arabaj ŝtatoj malkaŝe protektataj kaj instigitaj per senlima helpo de la rusa imperio kontraŭ Israelo.

 FRIDRICH DIRNMAT - FAMA SVISA DRAMATURGO.

- La subita atako kontraŭ Israelo dum la plej sankta tago, vekas konsternon kaj abomenon en ĉiu pensanta homo. Malgraŭ ni bezonas nafton ni ne devas aĉeti kun ĝi ankaŭ arabajn mensogojn.

Dum la okcidenta mondo silentis kaj brue aplaŭdis orienta mondo kaj instigis la molkorajn "arabajn ŝafojn" formanĝi la "isrealan lupon".

- Mi ne silentos, por ke ne pensu la mondo, ke mi konsentas kun la malhonestaj rilatoj de Sovetunio kaj ĝiaj ŝatelitoj. _ Mi apogas Israelon, por ĝi kaj por ni ĉiuj. Por ĝi, pro honesto, por ni ĉiuj, por rompi generalan silenton.

 HANS HABE - GRAVA GERMANA VERKISTO.

- Israelo ne bezonas kompaton, Israelo bezonas simpatian. Nenio povas devojiĝi min de mia kredo, ke Sovetunio intencas konkeri la mondon per nova Munkeno, - se ĝi sukcesos, kaj se ĝi ne sukcesos - perforte.

Israelo estas hodiaŭ la sola grava obstaklo en la vojo al ĝia superregado la mondon. De la morala vidpunkto Israelo estas giganto, kaj de milita vidpunkto, preskaŭ giganto. Israelo do estas por Sovetunio bonvena celo, precipe, ke la nocio "Israelo" kunigas nigrajn fortojn de la mondo: antisemitajn, faŝistojn kaj komunistojn.

SOL BELO - FAMA USONA VERKISTO. (PARTO DE LIA LETERO AL "LE MONDE" - PARIZO).

La 20-a jarcento komenciĝis en Francujo per afero de Dreifus. En la jaroj 1940-1945 regis en ĝi Laval kaj nun estas Pompidou, kies registaro subtenis la araban atakon kontraŭ Israelo. Francujo kunligis de la politika vidpunkto kun ĉiuj malamiko de Israelo, eĉ kun strangaj afrikaj demagogoj. Francujo kaŝas la fakton, ke Israelo estas sola demokrata respubliko, inter la arabaj ŝtatoj, kies premegeantaj reĝimoj estas malamikaj al fremduloj, kaj la feŭdala spirito ŝvebas super ili.

Ĉu forlasis la franca registaro sian fidelecon al libero, egaleco, kiuj karakterizis la francan kulturon? Ĉu ĝi volas, ke la franca kulturo estu komercaĵo simile al vino aŭ fromaĝo?

ELEN-SELITO - PROMINENTA ANGLA VERKISTO

Kiel socialisto mi ne povas apogi la vidpunkton de la arabaj ŝtatoj, ĉar en multaj de ili regas ankoraŭ mezepoka reĝimo.

La dekstraj arabaj nafto - ŝtatoj, kiuj salajrigas la militagadon de la palestinanoj, faras tion por moligi la premon en siaj landoj por solvi la internajn problemojn. Israelo estas demokrata ŝtato, pli demokrata ol ĉiuj aŭtokrataj ŝtatoj, kiuj ĉirkaŭas kaj minacas ĝin detrui.

STIVEN SPENDER - GRAVA ANGLA POETO

Israelo havas la promeson de la kultura mondo, ke ni helpos ĝin ekzisti. Post tio, kio okazis en la koncentrejoj, kie oni pruvis ekstermi la judojn, revenis la juda popolo kaj reŝanĝiĝis en Israelo. Ŝajnas al mi ke malplenumo de la promeso al Israelo flanke de aliaj ŝtatoj estas terurajo, eble la krimego de 20-a jarcento, ĉar ĝi signifas, ke post la koncentrejoj, post la provo ekstermi la judan popolon, ekesto de Israelo estas kvazaŭ pentofaro pro abomena krimo de la mondo por la restaĵo de judoj. Promeso de la mondo ebligis establi la judan ŝtaton evidentiĝis esti ŝajna promeso, ĉar nova ekstermo minacas Israelon. Pro tio la mondo devas subteni Israelon morale, kiel ni ne devas apogi iun alian en la mondo. Plu, Israelo estas socialista ŝtato, ŝtato en kiu regas justeco; ŝtato, kiu provis kaj provas senĉese kunvivi kun la araba loĝantaro. La fakto, ke la ŝtato estas malgranda devigas nin morale eĉ pli forte garantii ĝian ekzistadon.

 NE NUR PER LA NAFTO . . .

Ministro por eksterlandaj aferoj de Svedujo estis alarmita per ambasadoro de Libio je la 4-a nokte. La duonsvenigita ministro veturis tra la malplenaj stratoj de stokholma krepusko kaj estis akceptita sen ceremonioj en dormoĉambro de la libia diplomato:

Telegramo de Tripoli - proklamis la piĝamvestita libia diplomato - prezidento de respubliko la kolonelo Kadafi estas interesita ricevi ĉi jare Nobelpremion pro la bela literaturo.

Ĉu Nobelpremion de literaturo?

Jes! pro la bela literaturo.

Mi bedaŭras, via ambasadora moŝto - senkurbiĝante la dorson ministro - Sveda Akademio estas demokrata institucio kaj ĝiaj membroj estas sendependaj.

Stultaĵoj - respondis la ambasadoro - oni povas pendigi ĉiujn.

Sendube. Tamen mi ne antaŭvidas eblecon influ iĵian decidon, via ambasadora moŝto.

Bone - aludis la libia diplomato - do de morgaŭ ne estos nafto.

Li postulis skriban promenson ĝis tagmezo. La sveda registaro kunvenis je la escepta kunsido, ĉar la araba nafto donas 61% al la bezono de la mizera industria lando. La kunsido daŭris 22 horojn seninterrompe kaj malfermiĝis kun sciigo, ke estis preparolataj „problemoj de kulturaj interŝanĝoj kun Libio". La kolonelo Kadafi interpretis, ke ĝi estas impertinenta rifuzo kaj ricevis severan nervatakon en sia rekognoska tendo, starigita en klinika parto de la reĝa palaco. La juna prezidento disŝiris sian uniformon kaj forĵetis ĝin de fenestro:

Churchill ricevis Nobelpremion pro la literaturo laŭkriis de supro - ĉar li estis Aŝkenazo!*

Laŭ la religia enradikigita fono de kolonelo, ĉiuj muezinoj de lia lando anoncis teruran bojkoton kontraŭ "cionista Svedujo". De ĉiuj lokoj tuj ĉesigis ŝargado de nafto al ŝipcisternejoj en libiaj havenoj. La sveda ŝtatestro senprokraste petis renkontiĝon kun ambasadoro kaj substrekis dum interparolo la tradician amikecon inter la du nacioj.

La kolonelo Kadafi certe indas proponi sin al Nobelpremion diris ministro - tamen li ne devas tion fari kiel ultimaton.

La ĉefministro proponis kiel provizoran solvon, nekutime severege mallaŭdi Israelon pro malrapida disigo de militfortoj, tamen en tiu momento la laŭparoliloj jam dissendis la paroladon de prezidento Kadafi en la centra placo de Bengazi:

Solĵenicin, la komunisto, indas literaturan Nobelpremion - kriegis la estro - La Judo Ŝaja Agnon meritas ĝin, sed nacia Arabo ne meritas!

Kadafi tuj rezignis de sia posteno kaj ĵuris iri al la dezerto kaj planti karobon. La ploranta amaso bruligis laŭ kutimo usonan bibliotekon kaj laŭtakte kriegis:

No-bel! ka-da-fi! No-bel! Ka-da-fi!

Oficiala delegacio de indignitaj protestantoj piedforiris al Oslo. Okazintaĵoj ricevis dramatan rapidecon. En Svedujo oni rigore limigis la uzon de aŭtomobiloj, de elektra lumo kaj de necesejoj. La tempesta studenta demonstracio postulis tuj interrompi rilatojn kun frenezaj tiranoj de Tel-Avivo. Sub la premo de publika opinio ree kunvenis la akademio kaj pripensis malantaŭ fermitaj pordoj la severan staton de literaturo en la mondo. Laŭ sekretaj rakontoj akademianoj konstatis sen iu spuro de dubo, ke la regimentestro regis la arton de skribado kaj legado malgraŭ nur en Korano kaj nur per majuskloj. Pro tiuj novaj faktoj la skandinava ĵurnalistaro konsilis pririgardi la aferon de premio pli realece. Ŝtatestro de Svedujo forflugis al Tripoli por atingi pli profundan interkomprenon kun estraro de Libio. Laŭ onidiroj li proponis al Kadafi Nobelpremion pro kemio pro liaj atingiĝoj en petrokemia industrio. Libiestro profunde ofendiĝis kaj deklaris, ke li neniam estis malestimigita tiel cinike. Li promesis al rompita ŝtatestro de Svedujo teruran venĝon kaj forpelis lin de tendo. Kiam la ĉefministro reflugis al Svedujo, Oslo jam estis tuta en flamoj, ĉar libiaj demonstrantoj venis tien de Libio kaj erare bruligis la ĉefurbon de Norvegujo. Dum la fino de semajno du pasaĝeraj italaj aviadiloj estis eksplodigitaj en flughaveno de Bombajo per nova terora organizaĵo, kies nomo estis "Palestina nacia junularo por literatura justeco", kies bazo kaj mona subteno restis sekretaj. En svedaj domoj la hejtado tute ĉesis funkcii kaj civitanoj komencis fari brulŝtiparon de mebloj. Ambasadoro de Libio invitis la reĝon de Svedujo kaj riproĉis lin:

- Fi! Guĉjo, por kio vi atendas?

Prezidento de Ugando kolonelo Idi Amin sendis al la sveda registaro telegramon kun 14850 vortoj kaj postulis doni al Kadafi ĉiujn Nobelpremiojn, alie laŭ liaj vortoj, lia soldataro invados Stokholmon kaj ĝin detruos. La sveda registaro forĵetis liajn minacojn per akra diplomata skribaĵo. La reganta socialdemokrata partio laŭtvoce forĵetis ĉiujn trofruajn militajn pensojn pri la solvo de problemoj, kaj la ĵurnalo de partio en ĉefa artikolo analizis la gravecon de kulturrevolucio de la juna energia kolonelo "la brilantaj paroladoj de Muamar El Kadafi estas trasorbitaj per la religia-mistika konscio, kiu ĉiujn kaptas" skribis la ĵurnalo, "kolonelo donis novan enhavon al la militanta Islamo". Prezidento Pompidou proponis sian perantecon. Laŭ lia opinio oni devas dividi Nobelpremion inter brita filozofo Bernard Russel kaj Kadafi, sed kolonelo reagis nur per amara rido kaj ĉesigis alfluon de nafto al Francujo por du tagoj. Tiam venis neĝo kaj la propono, ke Svedujo kaj Libio kuniĝu. Unu konstitucio, unu armeo, unuiĝo de eksterlandaj aferoj kaj de psikiatriaĵoj institucioj. La respondo de Kadafi estis: literaturo aŭ nenio! Tiam jam elĉerpiĝis la kandeloj en urbegoj de Svedujo.

En tiu stadio publikiĝis la antaŭdecido de la akademio pri literatura premio por la jaro 1974. Sekvontan tagon denove enfluis en Bengazi la nafto en la naftŝipcisterojn.

Efraim Kiŝon

* Aŝkenazo - Judo de eŭropa deveno.

LA FAJROĈESO

La fajroĉeso jam estas fakto. La armiloj silentas. Nun ni povas pritaksi amplekson de lasta milito. Kiam Hitler atakis Sovetunion li amasigis 1800 tankojn kaj kelkcent aviadilojn. La arabaj fortoj, kiuj en Oktobro 1973 atakis Israelon konsistis:

En Egiptujo 800.000 soldatoj, 650 aviadiloj, 2500 tankoj. Ĉe la siria fronto: 150.000 soldatoj, 330 aviadiloj kaj 2000 tankoj, aldone unu jardenia kirasa divizio kun 80 tankoj. En lasta momento venis dua divizio, kiu tamen jam ne partoprenis en bataloj. Maroko sendis 1500 soldatoj kun tankoj. Krom tio Egiptujo kaj Sirio havis 185 baterioj kun raketoj SAM 2, 3, 6,. Kontraŭ tiuj armeoj staris lando

kun 3.000.000 loĝantoj inkluzive virinoj, infanoj, maljunuloj, malsanuloj kaj invalidoj. Araboj havis de la unua tempo senĉesan helpon de Sovetunio, kies aviadiloj Antonov (80 tunaj) ĉiun kvaron-horon alportis novajn murdigilojn.

KIU VENKIS EN LA LASTA MILITO?

Egiptanoj kaj Sirianoj venkis dum unuaj tagoj, trapasis israelan ŝtadimon, kaŭzis al ni multajn perdojn en nia armeo. Sed poste unue siria armeo estis forpelita ĝis la distanco 40 km de Damasko, kaj la egipta 3-a armeo estis ĉirkaŭata per niaj fortoj. Niaj soldatoj staris 55 km de Kairo. La milito finiĝis, ĉar Sovetunio rimarkis la neatenditan turniĝon de siaj satelitoj post sukcesplena komenco, kaj simple minacis enmiksiĝi rekte en la militon, sendis raketojn, kiuj povus surporti ĝis la centro de Israelo atomajn bombojn. USONO decidis tiam per sia influo ĉesigi la baraktadon kaj milito finiĝis.

Sed se ni parolas pri venko . . . al kiu utilis tiu milito? por kiu ĝi estis necesa?

Israelo jam delonge promesis priparoli retirigon, se Egiptanoj kaj aliaj arabaj ŝtatoj promesos pacon. Nun post la milito komenciĝis priparoloj kaj Israelo forprenis sian armeon de la Okcidenta bordo de Suezkanalo. En unua fazo de interparoloj la israela armeo staros 30 km orienten de antaŭa ŝtatlimo. Israelo ankaŭ al Sirio promesis retirigi armeon, kondiĉe ke siriaj kanonoj kaj tankoj ne prenos antaŭan lokon, de kiu oni povis senĝene bombardi niajn kibucojn kaj urbojn.

La kaptitoj inter Egiptujo kaj Israelo estas jam intersanĝitaj. 228 isrelanoj venis de Egiptujo kaj samtempe 8200 egiptanoj revenis al sia patrujo, inter ili estis 450 oficiroj.

Oni diras, ke unu horo de la milito kostis por ĉiu flanko 12 milionoj de dolaroj. La libanona ĵurnalisto skribis en libanona ĵurnalo, ke se Egipto investus en la egiptajn vilaĝojn la monon, kiun ĝi elspezis por la milito, tiam la egiptaj vilaĝoj en nombro de 4000, kiuj ne progresis de la tempo de faraonoj, aspektus plej bele en la mondo.

Al kiu do utilis la milito? . . .

Niaj malamikoj akuzis nin, ke en la jaro 1967 Israelo komencis la militon. 3 grandaj armeoj kelkfoje pli grandaj ol israela staris ĉe niaj ŝtatlimoj, pretaj por nin ataki. Se ni tiam atendus, kiel ĉi foje, nia tuta industrio estus detruita en unua tago. Tion ni volis eviti. Ĉi foje malgraŭ araba sukceso en unuaj tagoj, la israelaj nemilitaj objektoj preskaŭ ne estis tuŝitaj. Nur granda distanco de novaj ŝtatlimoj de niaj loĝataj centroj, permesis al ni la lukson atendi ĝis niaj malamikoj komencos la militon.

LA "VERO" DE SOVETUNIO

La 7-an de Oktobro 1973 unu tagon post la komenco de milito aperis en oficiala gazeto de Sovetunio "Pravda" ("La vero") tiu ĉi vera komunikaĵo:

"Post detala pretigo kaj mobilizo de rezervoj, atakis israela armeo Egiptujon kaj Sirion." Sama komunikaĵo estas ripetita oficiale la 8-an de Oktobro.

Sufiĉas konstati, ke Egiptujo kaj Sirio konfesis publike, ke ili eluzis la subitecon por ataki Israelon en tempo por si konvena.

H. Maŝler

MI REVENIS

Mi revenis la patrujon nian. Senbedaŭre ŝanĝis mi ĉielon kaj de la ĉefurb' ukraina Trafis la urbeton israelan.	Mi revenis la patrujon nian. Tion mi elektis laŭplaĉe. Nur en ĝi neniu kaj neniam ĵetos ofendigan: "For, judaĉo!"
Mi revenis la patrujon junan kun miljara histori' biblia. Kaj tra ĝia nebuloza nuno vidas helan estontecon ĝian.	Mi revenis la patrujon karan Kiel ĝia fil' - repatrianto. Kaj mi volas, ke en ĝi najbaroj Estu, kaj ivrit*kaj Esperanto.

Filo de l'popolo la antikva,
Ero de l'popolo esperanta,
Mi fiere kantas nun "Hatikvan"***
"La Esperon" mi fiere kantas.

* Ivrit - la ŝtata lingvo de Israelo (la hebrea)

** "Hatikva" (esperantlingve: La espero) - ŝtata himno de Israelo

KION SIGNIFAS JUDAISMO?

La kaŭzo, ke la Judoj malgraŭ ĉiuj ĉikanoj kaj pogromoj ne malaperis estas rezulto de ilia kultura aktiveco. Ni Judoj ekzistas malgraŭ la ondoj de malamikeco kaj danĝeroj minacantaj nin ĉiam.

Ni ja ĉiam povis solvi la "Judan problemon" per baptiĝo kaj asimilado. Se ni ĉesus esti Judoj, ni ne estus dornoj en ĉies okuloj. Niaj gastigantoj ne estus jaluzaj pri ni. Kiel unuopuloj ni povus ĝui trankvilan vivon kaj sekuron. Estas facile intermiksiĝi inter aliaj popoloj ne lasante eĉ spurojn de sia pasinta judeco. Malgraŭ tio la sola nacio, kiu restis post miljaroj estis Judoj. Per fervoro kaj sinofero Judoj gardas la torĉon de sia internacia vero. La malagrablaĵoj kaj suferoj ne estingis la torĉon de nia interna kredo kaj vero.

Multaj epokoj forpasis, de kiam niaj profetoj komencis skui la konsciencon de la homaro per ekscitaj krioj, ke la homaro devojiĝis de la morala vojo, ke la tero pleniĝis per krimo de individuoj, socioj kaj ŝtatoj. La profetoj vekis en ni la vizion kaj strebadon al pliboniĝo kaj riparo.

Kiel Judoj ni ne akceptas la doktrinon, ke la ordo de la mondo ne estas ŝanĝebla, kaj la ĝisnuna historio pruvis tiun ĉi veron.

prof. A.I. Heŝel

IOM PRI LA HEBREA LINGVO

La hebrea lingvo apartenas al la multbranĉa familio de semidaj lingvoj.

La popoloj kaj triboj, kiuj posedis tiujn lingvojn, vivis plejparte en tiu parto de Azio, en kiu troviĝas nia lando.

Ili nomiĝas Semidoj ĉar ilia praavo, laŭ la Biblio, estis Sem, filo de Noa.

La ĉefaj semidaj lingvoj uzataj nuntempe estas la hebrea, la araba, kaj la etiopa.

La hebrea estas unu el la plej antikvaj lingvoj en la mondo. Ĝi estis uzata en Israellando jam longe antaŭ la veno de la Hebreoj en Kanaanon (antikva nomo de Israellando).

De post la veno de la hebreaj triboj en la landon, ili adoptis la kanaan lingvon, kiu disvolviĝis kaj iĝis la nacia lingvo de la israelaj triboj kaj de la popolo de Israelo - ĝis hodiaŭ. Dum la epoko de la unua Templo regis la hebrea lingvo en Israelo kaj Judujo; en ĝi estis skribataj la Biblio kaj ĉiuj aliaj literaturaĵoj.

Post la detruo de la unua Templo, la aramea lingvo komencis anstataŭi la hebrean, kiel ĉiutaga interparolilo.

Dum la epoko de la dua Templo kaj eĉ poste, uzis ankoraŭ parto de la popolo la hebrean lingvon, sed la influo de la aramea kaj ankaŭ de la greka lingvo pligrandiĝis, ĝis la Judoj ĉesis uzi sian lingvon. La hebrea lingvo fariĝis "Sankta Lingvo", uzata nur dum preĝado kaj en religiaj verkoj.

Dum la longa epoko de ekzilo, la Judoj uzis la lingvojn de siaj najbaroj - en ilia originala formo aŭ en diversaj modifaĵoj (kiel la jida lingvo kaj la judhispana).

Sed kune kun la ekstaro de la cionisma movado kaj la revivigo de la juda popolo en sia lando, reviviĝis la hebrea lingvo.

La antikva hebrea lingvo estis transformata en modernan lingvon, efikan por ĉiutaga interparolo, por literaturo kaj por scienco. La malnova-nova lingvo estas la oficiala lingvo en la malnova-nova ŝtato de Israelo.

La komunan hebrean lingvon parolas ĉi-tie Judoj enmigrintaj el cent diversaj landoj kaj kulturoj. Ĝi servas, kiel grava ilo por reunuigi la Judojn, kiuj revenas hejmen el ĉiuj mondanguloj. La hebrea lingvo daŭrigas ĉiam sian evoluon kaj senĉese pliriĉigas sian vortprovizon.

Josef Ĥemer

IOM PRI LA HISTORIO DE ISRAELA ESPERANTO — MOVADO

Veninte en la jaro 1933 al Israellando mi ekkonatiĝis kun adv. Ĥeruti kaj pere li mi eksciis pri ekzistantaj esperantaj grupoj en urboj kaj vilaĝoj. Mi aliĝis al tel-aviva grupo por kune agi.

Dum la landa konferenco en Jerusalemo en la jaro 1934 oni festis la sesdekjaran naskiĝtagon de la neforgesebla pioniro N.B. Ĥavkin. En sama jaro oni solene inaŭguris en Tel-Avivo Zamenhofan straton. Ĉeestis inaŭguron fama esperantisto ĵurnalisto de "Nasz Przegląd" (juda ĵurnalo en pola lingvo) Oskar Berman. Por tel-Avivaj samideanoj estis granda ĝojo vidi, kiel tiama urbestro M. Dizengof tratondis la verdan rubandon.

Esperantaj kursoj ĉiam kaj en multaj lokoj funkciis. Gvidis la kursojn: E. Bor, O. Kuk, J. Armoni kaj mi. En Tel-Avivo adv. Ĥeruti permesis uzi sian oficejon por la kursoj, samon faris adv. Gorodiski. En la jaro 1938 venis nova fervora s-ano Ŝtampfer. Li prizorgis ejon por la esperanta grupo por konstantaj renkontiĝoj kaj gvidis kurson en lernejo "GEULA".

Dum la dua mondmilito, suferis multaj kulturaj entreprenoj, inter ili ankaŭ nia movado, sed ĝi neniam tute estingigis.

Dum la milito ni ofte gastigis esperantistojn, soldatojn kiuj tramarsiis la Landon por batali kontraŭ hitleraj trupoj.

La landan konferencon en la jaro 1942 partoprenis tri egiptaj samideanoj kaj unu ĉeĥa oficiro.

La Universalan Kongreson en Svisujo (1947) partoprenis tridek israelaj samideanoj.

Post fondiĝo de Israelo (1948) esperanta movado ricevis alian karakteron. Novaj homoj en la kadro de Esperato-Ligo Israela (E.L.I.) komencis funkcii. Kvankam ni kunvenis en privata ĉambro okazis ĉiam interesaj prelegoj. Indas substreki, ke Universalan Kongreson en Parizo (1950) la reprezentanto de la juna ŝtato jam oficiale partoprenis. ELI-anoj partoprenis poste preskaŭ ĉiujn kongresojn. En la jaro 1967 ĉio estas jam preta por okazigi UK en Israelo, sed pro sestaga milito la kongreso en la lasta momento estis translokigita al Rotterdamo. Dum la sama jaro M. Ben Porat organizis junularan grupon JELI, kiu ĝis hodiaŭ agas tre sukcese.

Nahum Drezner.

D-RO IMMANUEL OLSVANGER (13/4/1888 — 7/2/1961)

EMINENTA HEBREA ESPERANTSITO

D-ro Immanuel Olsvanger estis karakteriza juda akademiano. Li vizitis preskaŭ ĉiujn kontinentojn kaj multajn landojn kaj sciis perfekte multajn ĉefajn kulturajn lingvojn de la mondo.

Du deziroj ekscitis kaj maltrankviligis lin. Lia unua aspiro estis, ke efektiviĝu la profetaĵo de la juda geniulo d-ro L.L. Zamenhof kaj ekregu la internacia lingvo en la tuta mondo. Lia dua aspiro estis, ke la homoj surluniĝu. Li estis akceptita kiel membro de "La brita interplaneda asocio". Siajn ĉefajn fortstreĉojn li dediĉis al disvastigo de nia lingvo, en kiu li vidis unu de plej geniaj atingoj de la juda cerbo.

D-ro Immanuel Olsvanger naskiĝis en Polujo en la urbo Grajevo. Lia patro apartenis al cionistaj pioniroj kaj lia avo estis ĉefrabeno de Peterburgo. Hebraj verkistoj Piorko kaj Citron estis liaj instruistoj. Li studadis filologion kaj medicinon en Königsberg (Prusujo) kaj Bern (Svisujo). En la jaro 1916 li doktoriĝis post finverko de la disertacio pri "La entombiĝaj reguloj ĉe Judoj." Dum studjaroj en Svisujo li disfamiĝis kiel oratoro. Li apartenis al kreintoj de studenta cionista movado en Bern "Hehaver" (La kamarado).

Li estis membro de la folkloro asocio en Svisujo. En la jaro 1920 aperis lia libro "Sekvintraŭboj kaj migdaloj" en la jida lingvo kun latina alfabeto. En la jaro 1931 aperis lia dua libro en jida lingvo pri folkloro s.t. "Ruĝaj oranĝoj." En la jaro 1922 aperis en Kapstado lia verko en angla lingvo: "Diskutoj kun Eternulo"/

En la jaro 1925 aperis en Vieno liaj esperantaj poeziaĵoj s.t. "Eterna Sapiro". Tiu libro estis duan fojon eldonita en Jerusalemo en la jaro 1942 kun aldona fragmento de lia poemo. "Inter homo kaj Dio".

D-ro I. Olsvanger estis adoranto de d-ro L.L. Zamenhof.

Li vidis en lia personeco sintezon de geniulo kaj sanktulo. Li konis lin persone kaj fariĝis fervora aktivulo de esperanta movado.

Li tradukis multe de la hebrea literaturo esperanten. Inter aliaj lia traduko de Anski "Hadibuk" estis poste tradukita al la japana lingvo.

En la jaro 1930 li ricevis dum Universala Esperanto Kongreso premion en oratora konkurso.

LA FILOLOGO KAJ POLIGLOTO.

D-ro I. Olsvanger konis 18 lingvojn: hebrean, jidan, anglan, rusan, francan, hispanan, germanan, italan, latinan, grekan, polan, hungaran, bulgaran, litovan, sanskritan, japanan, ĉinan kaj esperanton. Li estis unu el la plej eminentaj tradukistoj al la hebrea lingvo. Li ricevis premion por arta traduko hebrean de "Dia Komedio" de Dante.

Kiel poligloto li povis objekte pritaksi la genian verkon de L.L. Zamenhof. Sed esperanto estis por li ne nur lingvo, sed ankaŭ rimedo por alproksimigi homojn por reciproka interkompreno, solidareco kaj amikeco inter popoloj kaj landoj en la tuta mondo.

Li dediĉis multajn jarojn por la hinda, antikva lingvo sanskrito. Li vizitis kvarfoje Hindujon, lernis ĝian lingvon kaj absorbis kulturon. Li ankaŭ tradukis de sanskrita lingvo al hebrea eposon Bhagavadgita (La poezio de la benitulo). Prof. Martin Buber skribis en antaŭparolo en tiu libro, ke estis granda kuraĝo traduki ĝin hebrean.

D-ro I. Olsvanger konis persone Mahatma Gandhi, Nehru kaj la plej grandan hindan verkiston Rabindranat Tagore.

Dum sia estado en Hindujo li alproksimiĝis al tieaj Judoj nomataj Bnej Israel (Filoj de Israelo). Li sukcesis elvoki ĉe ili liberigan cionistan fajron kaj kaŭzis ilian alvenon al Israelo. Li priskribis ilian historion, kiu laŭ la tradicio komenciĝis per ilia alveno tien, antaŭ 2000 jaroj.

LA POETO KAJ FILOZOFO

En la jaro 1943 aperis en hebrea lingvo la dialogo: "Inter homo kaj Dio." (Fragmento de ĝi aperis en Esperanto). En ĝi la poeto rakontas pri leterinterŝanĝo inter li kaj la Estro de la mondo. Olsvanger turnas sin al Dio, kiel amiko al amiko, li diskutas-kiel kamarado kun kamarado, ĉar laŭ lia opinio la Dio ne estas aparta estaĵo, sed li identiĝas kun la naturo kaj mondo, kaj kreas unu harmonian unuecon. Tio estas lia filozofia panteista mondkoncepto.

Li konsideras la tutan mondon, kiel unu harmonian orkestron. Li kunmiksiĝas kun la tuta mondo kaj naturo kaj sentas sin kiel parto de ĝi. Tio signifas, ke kiel li troviĝas en la naturo, tiel troviĝas la naturo en li.

La homo kaj la naturo formas unuecon.

Pro tio li vidis sin mem ne nur kiel civitanon de unu ŝtato sed ankaŭ kiel civitanon de la tuta mondo kaj la homaron kiel unu tutecon. La centra vojo por unuigi ilin gvidas per unu lingvo en la tuta mondo.

Kaj tiel proklamis la Biblio (Genezo 11): "Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero... Kaj ili diris: Venu, ni konstruu al ni urbon kaj turon, kies supro atingos la ĉielon... kaj la Eternulo mallevigis por vidi la urbon kaj la turon, kiujn konstruis la homidoj. Kaj la Eternulo diris: Jen estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas; kaj jen kion ili komencis fari kaj ili ne estas malehelpotaj en ĉio, kion ili decidis fari. Ni malleviĝu do, kaj ni konfuzu tie ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la parolon de alia. Kaj la Eternulo disigis ilin de tie sur la supraĵon de la tuta tero kaj ili ĉesis konstrui la urbon. Tial ili donis al ĝi la nomon Babel, ĉar tie la Eternulo konfuzis la lingvon de la tuta tero."

Tio signifas, ke unu komuna homara lingvo kunligos la homojn kaj faros de ili unu dian potencon. La unulingveco finos la regadon de Dio kaj komencos la vera humana regado de la homo, kiu alproksimiĝos rapide al la fonto de la vero. Tio signifas, ke la potenco de la unuigita homaro per unu lingvo estos pli granda ol la potenco de Dio. Kaj nur tiam marŝos la homo alten, al la pinto, al trono de Dio por ripari, kion li difektis. Kaj nur tiam povos la homo rigardi estontecon kaj vivon ne de la mallarĝa valo, sed de la pinto de plej giganta monto. Tio instigos la homon, donos kuraĝon kaj liberon marŝi ĉiam alten, supren por atingi plej altajn rangojn kaj ŝtupojn.

Aleksander MANOR

D-RO IMMANUEL OLSVANGER

ALTEN!

Alten sur gigantan monton, Por ekvidi la estonton! Ne el la mallarĝaj valoj Vi, kovritaj per vualoj, Povos vidi horizonton!	Vin la montoj pigmeigas, Altaj pintoj vin timigas, Tamen nin per pensfiero Ili logas al libero Al kuraĝo nin instigas!
---	--

Ronku do en la kabanoj, Vi eternaj kavernanoj! Ĉu vi sentas tondrajn bruojn? Rampu do en viajn truojn, Etaĵ vi, miopaj ranoj!	kiam tondro sin etendas, Ni ne timas, ni ne plendas: Estas ĝi triumf-fanfaro De la luma nov-homaro, - Ĝin kun ĝojo ni atendas!
---	--

Kaj kun rido sur la vangoj
Marŝas ni sur neĝ-lavangoj,
Super rokoj - kaj glacio
Al la pint' al tron' de Dio!
Supren, al plej altaj rangoj!

MIKOLAJ RYTJKOV (1913-1973)

POSTMORTAJ REMEMOROJ.

Mirindaj estas renkontiĝoj kun samideanoj ne konataj kaj samtempe tuj tre proksimaj. La senprokrasta amikiĝo estas unu de plej signifaj esprimoj de Esperantismo.

Mi renkontis Lin dum mia vizito en londona klubejo. Kiam oni anoncis mian prelegon. Li eksaltis ĉirkaŭbrakis min kaj diris: "jen tiu homo skribis sovetan anekdotaron. Mi petas vin rakonti al ni ankaŭ la israelajn."

Mi ne sciis, kiu li estas. Post iom da tempo mi eksciis pli detale. Li estis unu de senlimaj viktimoj de soveta reĝimo. Li trapasis 20 jarojn en sovetaj koncentrejoj pro la sola kulpo, ke li estis esperantisto. Kiam dum la ĥruŝĉova degelado li estis liberigita rehonorigita oni tuj rimarkis liajn kapablecojn. Li fariĝis aktoro kaj rapide avancis, ĝis li atingis postenon en la ĉefa nacia teatro en Moskvo, kaj kun ĝi venis al Vieno. Tie li elektis "liberecon" kaj restis en Okcidento. Poste li ricevis postenon en B.B.C. kie li estis anoncanto en la rusa lingvo. Li mem pretigis la programojn. Lia la plej amata temo estis legi por ruslingvanoj Solĵenicin. Li ricevis sciigojn, ke liaj prelegoj estas sunbendigataj en Sovetunio, reskribataj kun 10 kopioj kiel "Samizdat" (memeldonejo) kaj forvendataj kaŝe por 70 rubloj (la meza salajro monata de laboristo). Li konatigis Solĵenicin al Rusoj, kiuj ne povis ekkoni sian plej elstaran verkiston. Duan fojon mi renkontis lin en Aŭgsburgo kie li legis dum la teatra vespero sian tradukojn de Solĵenicin. Mi ne memoras al mi pli impresan teatraĵon, kiel ĝi, en mia vivo. La aktoraj kapabloj kun brila esperanta traduko estis por mi neforgesebla kultura frandaĵo. Kelkcent homoj sidis dum lia unupersona teatraĵo, kiel surdmutaj dum 2 horoj kaj poste venis tempestaj aplaŭdoj. Tiam Ryjtkov diris jam al mi,

"Soljenicin estas la plej elstara rusa verkisto. Eble pli altranga ol Tolstoj."

La trian fojon mi renkontis lin dum kunsido de MEM dum UK en Vjeno. Post granda atako de samideanoj de Bulgarujo, Polujo kaj Ĉehoslovakujo kontraŭ israelaj "imperialistoj" al israelanoj venis tempo respondi. Komencis batalo. Ĉe nia flanko ekstaris Rytjkov. Post lia brila prelego alproksimiĝis al li kelkaj samideanoj de orienteŭropaj landoj kaj malkaŝe diris al li "vi Rytjkov atendu! Bone ke Vi vivas... Vi eĉ en Londono povas esti atingita, atendu, ke vi ne pagu pro viaj eldiroj"... Rytjkov ne timis. Ili lin ne atingis. Li mortis je malica malsano en Londono. Li ne trovis feliĉon. "La aktoro povas senti sin bone nur inter samlingvanoj". Li pensis pri ruslingvanoj, sed same bone li sentis sin 8 tagoj dum la jaro dum UK, tie li estis feliĉa. Restu amiko en paco:

d-ro H. Maŝler

LA SORTO KAJ LA HUFFERO

(Je la memoro de d-ro Levitan, parenco de d-ro Zamenhof).

Dum varmega somera tago mi volis vojaĝi de Jerusalemo al la kolonio Bat-Ŝlomo (Filino de Salomono) - nord-orienten de urbeto Ziĥron Jaakov. La aŭtobusoj ne atingas kolonion mem, do mi devis marŝi piede de Ziĥron Jaakov.

Dumvoje mi ekmemoris al mi la legendon pri la reĝo Salomono. La reĝo kredis je astrologio kaj eksciis de la astroj, ke lia filino Balkis edziniĝos al iu malriĉa kaj malbela junulo. Salomono volinte eviti tion, sendis sian filinon al malproksima insulo. Tien li lasis konstrui altan turon, kie ŝi devis loĝi. Unufoje dum la semajno li sendis al ŝi manĝaĵon kaj aliajn bezonaĵojn, kiujn ŝi de la fenestro altiris supren per la ŝnuro. Tiamaniere ŝi devis resti izolita de la rilatoj kun aliaj homoj.

Sed iu ŝipo dronis proksime de la turo kaj nur unu de vojaĝintoj, malriĉa kaj nudpieda junulo savis sin, alnaĝante la turon en kiu loĝis Balkis. Memkompreneble ŝi ekamis lin, dividis kun li la manĝaĵon kaj vivis kiel edzo kaj edzino. Ili havis kelkajn infanojn.

Post kelkaj jaroj venis la reĝo viziti sian filinon kaj renkontis junulon en ĉifonaĵoj kun infanoj. Balkis

rakontis al la patro la tutan historion.

Salomon komprenis, ke ĝi estis la sorto de lia filino kaj evidentiĝas, ke kontraŭ la sorto nenio estas farebla.

Marŝante antaŭen mi renkontis rajdantaĵon sur azeno junuon, kiu demandis min kien mi veturas. Aŭdante, ke mi serĉas d-ron Levitan en Bat-Ŝlomo li konsilis al mi reveni al Ziĥron Jaakov, sed antaŭe trinki puran kaj freŝan akvon de la fonto, kiu estis antaŭ mi en la direkto de Bat-Ŝlomo. Li aldonis "Atentu, mi avertas Vin, ne iru al Bat-Ŝlomo. Ĉar d-ro Levitan troviĝas en Ziĥron Jaakov." La konsiloj de la junulo estis kontraŭaj, ĉar la fonto estis en alia direkto ol Ziĥron-Jaakov. Mi havas principon neniam reeniri, do mi daŭrigis mian vojon al Bat-Ŝlomo. Irante mi trovis hufferon brilantan kiel arĝento. Mia fantazio kaŭzis, ke mi ne dubis, ke ĉi tie troviĝis iam la historiaj ĉevaloj de la reĝo Salomono, kaj la huffero apartenas al iu de liaj ĉevaloj. Mi prenis la hufferon kaj daŭrigis iri.

Malgraŭ la atentoj en Bat-Ŝlomo mi renkontis d-ron Levitan kun la tuta familio. Dum la amika interbabilado mi rakontis al li la historion pri la renkonto kun junulo, pri reĝidino kaj pri la huffero.

La huffero troviĝas ĝis nun en mia ĉambro, kiel signo de feliĉo, kiun ĝi alportas. Pri la feliĉo kiun alportas la huffero kredas Judoj, Kristanoj Islamanoj, ankaŭ Persoj havas saman kredon (mirinde Persujo en hebrea lingvo estas "Paras" kaj huffero "parsa"). La kredo je la huffero estas pli disvastigita en la mondo ol iu de s.n. religioj, kaj ĉar mi ĝin posedas mi kredas, ke ĝi kaŭzos al nia redaktoro aperigi tiun felietonon.

J. Feĥter

Ni recenzas

MONOSILABOJ

ELI ricevis kiel donacon de d-ro Diderto Freto el Brazilio liajn duvolumajn poeziaĵojn s.t. "Monosilaboj" (sonetoj eld. en Rio de Janeiro 1972).

Mirinda estas la libro, la poeziaĵo kaj la verko de d-ro Diderto Freto. Ĝi estas jam atestita per diversaj revuoj

en la vasta Esperantujo. Ni povas nur aldoni, ke 216 sonetoj, mallongaj, klaraj, lirikaj kaj romantikaj permesas ĝui ilin ĉiujn, por kiu estis edukita en idealoj de amo, paco justo kaj vero. La tuto enhavas nek unu duŝilaban vorton. Majstra uzo de nia lingvo, kiu okazis taŭga ankaŭ por tiu ne ĉiutaga limigo. Ni ne scias, ĉu en iu alia lingvo iu sukcesis krei poezion kun limigo de la vortoj ĝis unu silabo... en esperanto ĝi sukcesis:

Idealo

Am' ver' ĉe l' ter' Just' bel' jen' cel! Sen' lac' lukt' por' pac!

Esperanto

Lingv' de l' mond', lingv' de l' hom!
Kler' sur ter', font' de am', nun' jam.
Ĉetebbla ĉe ELI prezo por du volumoj 10 liroj.

H.M.

ANGULO DE J.E.L.I.

P O E Z I A J O J

Krokodilo

Pro la nomo sia ploris
Eta krokodilo;
Mia nomo misa estas,
Mi ne estas ilo!
Pri signifo de la nomo
Oni ne klopodas!
Ĉu per mi, aŭ per gepatroj
Iu ajn krokodas?
Venis patro kaj patrino,
Kune venis ili:
"Kiel vi ne hontas, Kroĉjo,
Stultaĵojn babili?"

Via nomo, karuleto,
Bele ja sonoras,
Estas milo, filo, Nilo,
Kaj neniu ploras".
Sed haltigi larmdiluvon
Ili ne sukcesis,
Kaj ideto kompatinda
Lamenti ne cesis.
Restis sen efik' gepatraj
Penoj malfacilaj,
Kaj de tie venas diro:
"Larmoj krokodilaj".

Ŝafo

Juna malsperta ŝafo
Invitis leonon al kafo.
Sed li ne venis, ĉar leon
Trinkas nur teon.

Struto

Ŝtulta struto sian kapon
Ŝovis sub grandegan ĉapon.
Ju diris: "Kara Struto,
Vi similas al mamuto!"
Kaj la struto pro la honto,
Forveturis al Toronto.

Bovo

Miopa avino demandis la bovon
Ĉu li kovas ovon.
Diris bovo: Fi, avino,
Mi estas bovo, ne bovino!

Anat Zdunski

E. L. I.

AL LA REDAKCIOJ KAJ ASOCIOJ

En la jarlibro de UEA erare aperas la adreso de Esperanto Ligo en Israelo en Tel Avivo - Rembrandt strato. La adreso de longe ne estas aktuala. Ni afable petas Vin informi samideanojn per siaj bultenoj kaj cirkuleroj, ke la adreso de E.L.I. kaj de "Israela Esperantisto" estas: Tel-Avivo p.k. 39004.

AL NIAJ EKSTERLANDAJ SAMIDEANOJ

"Israela Esperantsito" estas forsendata eksterlanden al preskaŭ 300 adresoj. Parto de ili skribas al ni aŭ iel donas al ni signon ke ili ĝin ricevas kaj estas interesataj pri plua ricevo de nia revuo. Ni do turnas nin al ĉiuj, kiuj estas interesataj pri ĝi, skribi al ni tion, ĉar alie ni ĉesos ĝin sendi. Prezo de nia ĵurnalo estas 3 usonaj dolaroj jare. Kelkaj samideanoj sendis al ni monon en leteroj kaj kelkfoje la mono estis forŝtelita, do estas pli bone sendi monon per ĉeko en letero al "Israela Esperantisto". Ankaŭ tiu solvo ne estas konvena, ĉar enkasigo estas multekosta, sed pli bona ol sendado de la mono letere. Bone estus, se iu samideano volus esti peranto por sia lando, tiam la bankelspezoj estus malpli grandaj kaj ni povus doni rabaton 30% al li. Ni eldonas 3-4 numerojn dum la jaro.

La samideanoj en nepagipovaj landoj daŭre ricevos nian revuon, se ili skribos al ni, ke ili interesiĝas pri ĝi, se ni ne ricevos de ili sciigon, ni ĉesos ĝin sendi.

AL ISRAELAJ SAMIDEANOJ

Nia movado ree baraktas kun problemo de mono, kiu akriĝis pro la lasta altiĝo de prezoj. Nian revuon ricevas ĉiuj anoj de ELI, sed ELI ne povos tion fari plu, se membroj ne pagos kotizon. Dum la lasta tempo nur triono de la membroj pagis la kotizon kaj de ili nur parto la tutan. Ni aldonas al ĉiu numero la ĉekon per kiu oni povas pagi la kotizon. Tiuj, kiuj pagos la kotizon certe ricevos revuon. Aliaj, kiuj pagas la parton kaj ne povas pagi la tutan ankaŭ ricevos ĝin. Tiuj, kiuj ne povas entute pagi almenaŭ bonvolu skribi al ni, ke ili estas interesitaj pri la ricevo de nia ĵurnalo.

La kotizo estas 20 lirojn jare.

EL NIA MOVADO KAJ AGADO

E.I.I. sendis al Ŝtatprezidento prof. E. Kacir fotografajojn de renkontiĝo kaj ekzemplerojn de "Israela Esperantisto" kaj "Heroldon de Esperanto". Returne Prezidento sendis al ELI dankleterojn.

NOVAJ KURSOJ

Malgraŭ malfavoraj cirkonstancoj, kiel milita stato kaj malfacilaĵoj kun la urba trafiko vespere, komenciĝis la kurso en Tel-Avivo. Enskribiĝis dum la unua leciono 23 lernantoj. La kurso kovris elspezojn de la propagando kaj eĉ restis profito por ELI. La kurson gvidas d-ro Maŝler.

Pri novaj kursoj sciigas ingeniero M. Savir el Jerusalemo kaj Aŝer Ron el Raanana.

En Kfar-Saba s-ano J. Giladi finis unu kurson kaj nun komencis la duan (20 lernantoj)

En Tel-Avivo gvidis kurson Anat Zdunski. Prosperas ankaŭ la koresponda kurso.

ELDONAĴOJMULTKOLORAJ POŝTKARTOJ

Israela Fruktkonsilantaro aldonis esperantlingvan libreton kosistantan el 6 multkoloraj poŝtkartoj. Sur la poŝtkartoj troviĝas esperantlingvaj receptoj de manĝaĵoj preparigotaj el avokado. La celo de la eldono estas reklami la israelan eksporton de avokado eksterlanden.

Gesamideanoj, kiuj korespondas kun eksterlandaj amikoj (kaj ĉefe amikinoj), kaj volus sendi al ili belan poŝtkarton - povas ricevi la libreton senpage ĉe P.K. 33147 Tel-Aviv 61330.

Bonvolu skribi, kiom da poŝtkartoj estas dezirataj kaj aldoni poŝtmarkon por sendado.

ESPERANTAJ KANTOJ.

Komponisto prof. V. Heimlich eldonis per siaj rimedoj kolekton de 37 esperantaj kantoj kun melodioj komponitaj de li. Inter ili estas tre konataj kantoj en esperanta mondo: de Zamenhof (Ho mia kor'), Goethe - Kalocsay (Dornrozeto) krom ili kantoj de Baghy, Zanoni, Grabovski kaj multaj aliaj. Aĉetebla ĉe komponisto :Herclia Havacelet Haŝaron 35.

SCIIGOJ.INTERVJUO EN RADIO

En radio estis intervjuitaj pri Esperanto d-ro Maŝler kaj Anat Zdunski. La intervjuo okazis dum la kurso por komencantoj en Tel-Avivo. Kelkajn demandojn respondis ankaŭ tre lerte lernantoj.

PRELEGO EN MEZLERNEJO

D-ro Maŝler prelegis en Nes-Ciona mezlernejo pri nia lingvo. Post la prelego pluraj gelernantoj esprimis volon lerni la lingvon. Petantoj ricevis informilon pri koresponda kurso.

La 30-an de Januaro ELI ricevis kiel heredaĵon mil pundoj de (Memoro Lia estu benita) s-ano Jaakov Gurvic en Jerusalemo. ELI esprimas al Lia familio dankon kaj omaĝon por Lia honoro. Iomete malfrue, ELI decidis enskribi Lin kiel Honoran Membron de nia organizaĵo.

 LA LANDA KONFERENCO

La Landa konferenco okazos ĉi jare la 11-an de Aprilo je 6-a horo vespere en Bejt-Lesin, Tel-Aviv, Weizman str. 11.

Pro la manko de la tempo la tagordo ne enhavos artan parton.

Tagordo: Raportoĵ de la estraranoĵ.
Diskuto
Elektoĵ

 KORESPONDPEĤOĵ

Volas korespondi bulgara Prof. K. Kalĉevski V. Tolbuĥin str. V. Kolarov 63a kiu interesigas pri la vivo la deziroĵ kaj la kulturo de israela junularo.

Fraulino Maide Coêtho R-Gen Sampaio, 1373. 60.000 Forteleza-Cearà. Brazilio. lernas en universitata kurso.

S-ro Allan C. Boschen, 195 Patridge Road, Pittsfield, MA 01201, USONO.

Jakupoviĉ Mehmed, Franĵe Matkoviĉa 16 Rijeka 51000 Jugoslavio. Interesigas pri kibuĉoj ilia organizo, bazo de ili ktp.

 NI GRATULAS

Gratuloĵn al ges-oĵ Murĵan, okaze de edziĝfesto de ilia filo.

Al s-ano Cvi Levenkopf de kibuĉo "Maagan" - niajn sincerajn kaj elkorajn gratuloĵn, okaze de la naskiĝo de lia unua nepo Ilan, filo de lia filino Ofra.

Korajn gratuloĵn kaj sincerajn bondeziroĵn al nia
ĉatata kaj agema s-ino

A N A T Z D U N S K I

kaj sia edzo, pro ilia edziĝfesto

E.L.I.

J.E.L.I.

Israela Esperantisto

 NIAJ LEGANTOĵ SKRIBAS

"Estimataĵ Samideanoĵ,
Kvankam ne ofte alvenas numeroĵ de "Nia Ligilo" (nun "Israela Esperantisto"), ili estas ege bonvenaj kaj mi tre ĉatas ilin.

En numero (antaŭ unu jaro) ekzemple, aperis artikolo (de Aleksander Manor) pri la opinioĵ de Zamenhof pri cionismo kaj judaismo, kiun-kiel juda Esperantisto - mi ĉiam tenos kun miaĵ pleĵ karaj kaj gravaj Esperantaj libroĵ".

Thomas H. Goodman - USONO

En lasta tempo Israelanoĵ komencis ricevi abundon de leteroj de samideanoĵ de multaj flankoj de la mondo kun konsoloĵ, kiuj esprimas sian simpatioĵ al nia lando. Pro manko de la loko en nia revuo ni al ĉiuj dankas tutkore.

 האספרנטיסט הישראלי

 בטאון הליגה לאספרנטו בישראל

 תל-אביב ת.ד. 39004

 חוברת 50 - מארס 1974 - בעריכת אלכסנדר מנור

 "ISRAELA ESPERANTISTO" (ANTAŬE "NIA LIGILO")

ORGANO DE ESPERANTO-LIGO EN ISRAELO

(E.L.I.)

Tel-Avivo 61390, Poŝtkesto 39004.

N-RO 50 — Marto 1974

 E N H A V O

David Ben-Gurion	1	A. Manor
La homoj de konscienco	2	A.M.
Ne nur per la nafto	4	E. Kiŝon
La fajroĉeso	6	H. Maŝler
Mi revenis	8	S. Mizeruĥa
Kion signifas judaismo	9	A.I. Heŝel
Pri la hebrea lingvo	9	J. Ŝemer
Iom pri la historio de la israela esperanto-movado	11	N. Drezner
D-ro Immanuel Olsvanger - eminenta hebrea esperantisto	12	A. Manor
Nikolaj Rytjkov - esperanta aktoro	15	H. Maŝler
La sorto kaj la huffero	16	J. Feĥter
<u>NI RECENZAS</u>		
Monosilaboj	17	H.M.
ANGULO DE J.E.L.I		
Poeziaĵoj	18	A. Zdunski
<u>E.L.I.</u>	19	
Al la redakcioj kaj asocioj		
Al eksterlandaj samideanoj		
Al israelaj samideanoj		
<u>EL NIA MOVADO KAJ AGADO</u>	20	
Novaj kursoj		
Eldonaĵoj		
<u>NIAJ LEGANTOJ SKRIBAS</u>	23	

 Redakta komisiono:
 J. Giladi, A. Zdunski
 Redaktoro
 Aleksander Manor